

LA SENPERA VERBIGO  
DE ADJEKTIVOJ

REPRESO DE ARTIKOLSERIO  
EN „DIA REGNO“ 1955

DE

H. A. DE HOOG



LIBROSERVO DE K.U.N.E.

DRUIVENSTRAAT 32 DEN HAAG NEDERLANDO



LA SENPERA VERBIGO  
DE ADJEKTIVOJ

REPRESO DE ARTIKOLSERIO  
EN „DIA REGNO“ 1955

DE

H. A. DE HOOG



LIBROSERVO DE K.U.N.E.  
DRUIVENSTRAAT 32 DEN HAAG NEDERLANDO




## ANTAŬPAROLO

La interesiĝo por gramatikaj temoj estas ĉiam vigla inter la Esperantistaro. Tio pruviĝis ankaŭ dum la aperado de la ĉi tie represita artikolserio, en Dia Regno.

Laŭ peto de kelkaj ni publikigas ĝin, por ke ĝi trovu pli vastan publikon kaj fariĝu pozitiva kontribuo al la solvo de interesa problemo.

Ĝi renkontu same bonan akcepton kiel la libro „Du Malsanoj en Esperanto” de la sama aŭtoro.

Libroservo de KUNE,  
Druivenstraat 32,  
HAGO, Nederlando.



## Ĉu nova malsano ?

### § 1.

En la publika kunveno de la Akademio de Esperanto dum la Harlema kongreso, S-ro I-ro Isbrucker, la prezidanto de tiu alta lingva institucio, kies tasko ja estas kontroli la sanon de nia lingvo, esprimis sian opinion, ke li sentis ian neregulajon ĉe la palpado de la lingva pulso de Esperanto.

Lia averto koncernis la ĉiam pli disvastiĝantan uzadon de la senpera verbigo de adjektivoj. Oni diras ja: Li pravas; Tio sufiĉas; Ŝi malsanas; Ĉu vi pretas?; Necesas fari tion; k.t.p. S-ro Isbrucker ne donis argumentojn por sia kondamno de tiaj formoj, sed simple konstatis: „Tio ne estas ĝusta. En bona Esperanto oni diras: Li estas prava; ŝi estas malsana; estas necese fari tion .... k.t.p.”

Kc tiu „peko” jam profunde enradikiĝis en niaj vicoj montriĝis kelkajn sekundojn poste, kiam unu el la akademianoj uzis la esprimon: „Sed tio tute ne gravas”; kaj unu el liaj kunfratoj scke kaj laŭte interrompis per: „.... ne estas grava ....”; kio kaŭzis grandan eksplodon de ridado!

Prof-o W. J. Downes, akademiano, en la sama kunveno iom substrekis la opinion de S-ro Isbrucker, aludante la Lingvan Respondon de Zamenhof, en kiu tiu deklaras, ke „as, is” k.t.p. **ne** signifas „estas, estis”.

\*

Ni esploru la konstatitan fenomenon kaj ekzameni ĝin por ekscii, ĉu ĝi vere estas malsano aŭ eble tute normala evoluado en la lingvo. La senpera verbigo de adjektivoj estas tre favorata de beletristikuloj, ĉu poetoj aŭ verkistoj. Jam Grabowski libere kaj ofte uzis ĝin.

Eĉ, li proponis, kaj mem uzis, formojn kiel „amatas”, anstataŭ „estas amata”. Laŭ tiu modelo ni do povus diri, kaj en poezio tio povus esti tre oportuna: „Laŭdatu la Sinjor’”, anstataŭ „La Sinjoro estu laŭdata”.

Tiaj formoj ne estas tre klaraj en la ordinara lingvo kaj verŝajne tromalfaciligus la lernadon de la verboformoj. Zamenhof malkonsilis ilian uzadon en siaj lingvaj respondoj (L.R. 3-a eldono, paĝo 70) per jenaj tre

mildaj kaj indulgaj vortoj: „La formoj „amatas, amitas, k.t.p.” anstataŭ „estas amata, estas amita”, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni tre bone povus uzi ilin. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia **propra** iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se „as, is,” k.t.p. signifus „estas, estis”; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo esti, tamen ĝis nun (t.e. Aprilo 1907) ili tiun ĉi signifon **ne** havas”.

Post tio „amatas, laŭdatu” k.s. preskaŭ tute malaperis el nia literaturo. Nur en siaj tradukoj „Infero” kaj „La Tragedio de l' Homo” Kalocsay uzas ilin, sed nur esceptokaze. La senpera verbigo de aliaj adjektivoj tamen tre prospere floris, precipe en la poezia lingvo.

- Ekz. 1. Vi **satos** en kontento (estos sata) (Infero 78)
2. Ja **indas** plenumiĝi tia plaĉo (estas inde) (Infero 78)
  3. Ĝi **ruĝegas** kvazaŭ ĵus el flamo (estas ruĝega) (Infero 78)
  4. Vi same **belas** kiel. (estas bela) (Eterna Bukedo 96)
  5. Miaj tagoj **nigris** (estis nigraj) (E.B. 95)
  6. Birdotriloj **mutas** (estas mutaj) (E.B. 95)
  7. Folioj **palas** (estas palaj) (E.B. 95)
  8. Se neĝo **blankas** (estas blanka) (E.B. 97)
  9. Ĝiaj okuloj sunon ne **egalas** (estas egalaj al....)
  10. Vi **fieras** (estas fiera) (E. B. 149)
  11. Se ĝi **lacas** (estas laca) (E.B. 79)
  12. La muroj neĝe **blankas** aŭ arde **flavas**. (Cezaro 97)
  13. Nek birdoj **aŭdeblas**, nek besto **videblas**. (Cezaro 30)
  14. La giganta ĉielkloŝo **vastas**. (Cezaro 30)
  15. **Sufiĉas**. Por mi **gravas nur** (Cezaro 106)
- Iom pli malproksimen iras Degenkamp en sia „Esperanto 60-jara”:
16. En tiu tempo **konstateblis** (34)
  17. ....verkoj en kiuj **malfacilas** distingi inter.... (35)
  18. **Rimarkindas, ke**.... (42)
  19. ....**kompreneblas**, ke ĝi estas bone farita (41)
  20. Ĉu ili **oportunas?** (La Nevenkebla Ĝeno, Faulhaber, 11)



Kion faris Zamenhof? Ĉu li mem uzis tiun senperan verbigon de adjektivoj? Sendube!

## § 2.

1. En Ekzercaro § 7 ni jam trovas: Kiu kuraĝas rajdi sur leono? Kaj en la sama paragrafo Zamenhof difinis kuraĝ' kiel adjektivon! La signifo de kuraĝi nepre ne povas esti alia ol: esti kuraĝa!

En Ekzercaro § 42 Zamenhof mencias la vortojn *s a n i* kaj *m a l s a n i* kaj eĉ la imperativon *s a n u*, kiu ja certe ne povas signifi ion alian ol: Estu sana!

2. Tralegante la Proverbaron de Zamenhof mi renkontis i.a.:

- 16. Patroj avaras (= estas avaraj), infanoj malŝparas.
- 37. Malbona virino diablon superas (= estas supera al...)
- 87. Ne ĉio utilas (= estas utila), kio brilas.
- 273. Estro ne malsatas (= estas malsata).
- 276. En feliĉo ne fieru (= estu fieraj).
- 311. Kiu ŝteliston regalas, mem ŝteliston egalas (= estas egala al...)
- 315. Suspekto pruvon ne egalas.
- 299. Propra volo ordonon superas.
- 517. Kiu forton ne havas, ĉiam malpravas (= estas malprava.)
- 654. Eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas (= estas sufiĉa.)
- 882. Kiu jam havas, tiu pravas.
- 930. Kiun favoras la sorto, .... (estas favora al...).
- 1134. Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas. (= estas egalaj).
- 1190. Kapoj diferencas, kranioj egalas.

## § 3.

3. En artikolo en *La Progresanto* 1954 n-ro 11, Prof. Downes atentigas pri la senpera verbigigo en Ps. 32 : 11: „Ĝoju kaj g a j u, ho justuloj”, kiel traduko de la hebreaj verboformoj „ŝimhu...vegilu”. Li aldonas: „Traduko per stataj adjektivaj formoj („estu ĝojaj kaj gajaj”) estus terure malverva kaj nevera”.

Ĉu vere? Miaopinie la afero estas multe pli simpla. Unualoke mi volas rimarkigi, ke „ĝoji” ne estas senpera verbigo de „ĝoja”, sed ke, inverse, „ĝoj” estas laŭ origino, verba radiko (pri tio poste). Estas do tre nature, ke Zamenhof uzis ĝin kiel tradukon de hebrea *v e r b o*. Sed la hebrea originalo havis **du** verbojn kaj Zamenhof derivis la duan de „gaja”, formante „gaji”. Tion saman li faris en Ps. 31 : 7: „Mi gajas kaj ĝojas pro via favoro”.

La du hebreaj verboj estas sinonimaj kaj ambaŭ povas esprimi eksteran manifestadon de ĝojo, kvankam la dua, „vegilu”, esprimas tion eble iom pli emfaze.

Sed en Ps. 96 : 11 kaj Ps. 97 : 1, kie, laŭ mia konkordanco, la hebrea teksto havas formojn de la **samaj** du verboj, ni legas: „Ĝoju la ĉielo kaj **estu gaja** la tero” kaj „Ĝoju la tero, **estu gajaj** la insuloj”.

Tial ŝajnas al mi, ke oni volas pruvi tro multe, konstruante diferencon inter *g a j u* kaj *e s t u g a j a*.

Zamenhof simple tradukis la hebrean taŭtologion (tre kutima fenomeno en tiu lingvo) jen per ĝoji kaj gaji, jen per ĝoji kaj esti gaja, uzante en iu vespero la senperan verbigon kaj en alia vespero, eble kelkajn semajnojn poste, ne uzante tiun eblecon.

— Sufiĉe niaj ekzemploj pruvas, ke Zamenhof uzis, kvankam ŝpare, la senperan verbigon de adjektivoj.

#### § 4.

Sur tiuj vojoj evoluis Esperanto kaj ĝuste la oportuneco de tiaj tujaj derivaĵoj estas de netakseble granda valoro kaj granda avantaĝo kompare kun la deriva sistemo de ekz. Ido.

Kelkaj ekzemploj ankoraŭ:

1. Ĉu li pretas helpi vin? (= estas preta)
2. Ŝi estas tre simila al sia patro, flanke de: Ŝi tre similas sian patron.
3. Ne necesas diri, ke . . . .
4. Li estas avida al laŭdoj, flanke de: Li avidas gloron.
5. Ĉu tio vere gravas? = Ĉu tio vere estas grava?
6. Li ne kapablas fari tion (= ne estas kapabla por fari tion).
7. Ŝi jaluzas pro la bonfarto de sia fratino (= estas jaluzata).

8. La elementoj ekstere **sovaĝas**.
9. Tiam mi vin ne pli longe **maloportunas**.
10. Tie **abundas** serpentoj kaj lacertoj.

Kaj pensu pri: kontenti, kulpi, furiozi, inklini, frenezi, malfrui, obstini, vigli, vani, atenti.

Ĉu vere ĉiuj tiuj verboj estas „malbona Esperanto“?

Multaj el ili (n-roj 2, 4, 7, 8, 9; furiozi, inklini, kaj eble ankaŭ la aliaj) estas uzitaj ankaŭ de Zamenhof!

## § 5.

La proceso estas certe progresigata de la cirkonstanco, ke flanke de la senpera verbigo de adjektivoj ekzistas en ampleksa grado la inversa proceso, nome: la senpera adjektivigo de verboj.

Ni jam vidis kiel flanke de ĝoji oni uzas „esti ĝoja“. Laŭ Prof. Downes (La Progr. 1954, 81) ekzistas ia diferenco inter tiuj du, kiu kongruas kun aŭ almenaŭ respondas al la diferenco inter la anglaj esprimoj *to rejoice* kaj *to be joyful*, el kiuj la unua signifus „montri (esprimi) ĝojon“, kaj la dua „esti ĝoja“. Kompreneble akademiano Downes plene konscias pri la danĝero pravi fenomenojn en unu lingvo per ilustrantaj ekzemploj el dua lingvo, kvankam tio kelkfoje povas esti neevitebla.

Sed, lasante tion flanken, mi timas, ke la diferenco kiun D. konstruas, ne trovas bazon eĉ en lia propra lingvo. Ĉar, komparante ekz. la hebrean, la esperantan kaj la anglan tekston de Ps. 31 : 7 kaj Ps. 32 : 11, ni trovas en Esperanto: 31/7: gajas kaj ĝojas; 32/11: ĝoju kaj gaju. Tio kongruas kun la hebreaj verboj, kies sinsekvo estas *inversa* en la du lokoj. Sed en la angla psalmaro ambaŭ tekstoj havas *be glad and rejoice* en la **sama** sinsekvo!

Kaj en Ps. 96 : 11 kaj Ps. 97 : 1 ĝi havas, inverse *rejoice and be glad* (Book of common prayer), dum la hebrea sinsekvo estas en 96/11 kiel en 32/11 kaj en 97/1 kiel en 31/7. (En 97/1 ankaŭ Zamenhof inversigas la sinsekvon.)

Cu tio ne pravas la grandan sinonimecon de ambaŭ esprimoj, uzitaj por traduki la hebrean paralelon? Ĉu estas ia diferenco inter Ps. 35 : 9: *Be joyful in the Lord*

kaj Ps. 33 : 1: Rejoice in the Lord? La „Oxford Dictionary”, kiu por (ĉiuj?) angloj parolas en tio la lastan vorton, donas por to rejoice i.a. to make merry (COD), sed ankaŭ: to feel joy, **to be glad**, to take delight in (COD) kaj **to be full of joy**, **to be glad or greatly delighted** (SOD).

## § 6.

Ĝuste kiel ĝoji estas paralela kun (aŭ: paralelas kun!) esti ĝoja ni trovas:

La ligno putras — estas putra.

Li sukcesas en tio — estas sukcesa.

Ĉiuj silentis — estis silentaj.

Ĉu vi timas — estas tima?

Ĉagreni — esti ĉagrena; indigni — esti indigna; alterni — esti alterna; brili — esti brila; abomeni — esti abomena; konscii — esti konscia; konveni — esti konvena; distri — esti distra; ktp, ktp.

Ĉu tiu paralelismo signifas identecon de ambaŭ esprimoj? Nu, ni provu: Ni jam vidis ke inter „mi ĝojas” kaj „mi estas ĝoja” ekzistas tiu identeco. Tutsimple ĉar ĝoji estas **states** prima verbo. Ankaŭ estas indiferente, ĉu oni diras al iu: „Silentu”, au: „Estu silenta”, ĉu oni asertas: „Tio estas konvena al mi”, aŭ „Tio konvenas al mi”; ĉu oni konfesas: „Mi konscias pri mia kulpo” aŭ: „Mi estas konscia pri mia kulpo”.

Sed inter „La ligno putras” kaj „La ligno estas putra” mi vidas nuancon da diferenco. La unua frazo esprimas **proceson**, la dua **staton** kaj dependas tute kaj nur de la parolanto, el kiu vidpunkto li faras sian deklaron.

Anstataŭ: „Laodoro estas abomena”, neniu diras: „Laodoro abomenas”, simple pro la fakto, ke ni neniam povas uzi la verbon abomeni sen **persona** subjekto (mi, ni, ili abomenas...)

Tiaj konsideroj vidigas al ni jenan gravan konkludon:

**La identeco aŭ neidenteco de ambaŭ esprimoj tute dependas de la esenca signifo de la radikoj.**

Ĉi tiu konstato ĉe la senpera adjektivigo de verboj valoros por ni (estos valoro por ni!) ĉe la esploro de la inversa fenomeno: la senpera verbigo de adjektivoj.

## § 7.

En niaj paragrafoj 1-4 ni vidis la ampleksan vastecon de la uzado de verboj, senpere derivitaj de adjektivoj, kiel ĉe Zamenhof, tiel en la cetera Esperanta literaturo.

Kaj oni vere komencas miri pri la averto de S-ano Isbrucker kontraŭ tiu fenomeno, kiu certe jam tiel disvastiĝis, ke ĝi estas esenca trajto de nia lingvo, neekstermebla.

Prof-o Downes prenis sur sin la defendon de la malaprobo en du artikoloj en „La Progresanto” 1954, n-roj 10 kaj 11.

Malfacila tasko!

Laŭ lia unua artikolo la uzado de -i anstataŭ esti -a estas **gramatika krimo**, grava, eĉ tragedia afero por nia lingvo, laŭ la dua ĝi estas ankaŭ **lingva krimo**, entute ĝi estas „minaco por la koro, la animo de nia lingvo”.

La starpunkton de D. mi provos resumi en 6 tezoj:

1. Nia lingvo havas tri ĉefajn kategoriojn de radikoj:
  - a. O-vortoj, kies radikoj havas substantivan karakteron (kiel dom’);
  - b. A-vortoj, kies radikoj havas adjektivan karakteron (kiel riĉ’);
  - c. I-vortoj, verbkarakteraj (kur’, sid’, ag’, dorm’, k.s.)

Tio estas la principo de De Saussure, aprobita de Zamenhof.

*Rim.: Tre strange estas ke en la dua artikolo D. kun evidenta konsentado dismetas la ideojn de sia amiko J. H. Gill, kiuj estas tute kontraŭaj, nome: „Kun kelkaj esceptoj la radikoj ne havas gramatikan karakteron, sed signas „nudan ideon”, ekz. en la vorto broŝ’ jam estas la tri kategorioj O.I.A.”*

*Mi atentigas pri tiu kontrasto, kaj miras ke eĉ nun ekzistas ankoraŭ Esperantistoj, kiuj defendas tiun jam tute venkitan starpunkton, kiuj farus la signifon de la vorto kombo duba, kaj la vorton kombilo superflua!*

2. Ĉe rekta verbigo de O-vortoj la radiko alprenas **adverban** karakteron: marteli = martele -i = agi per martelo; reĝi = reĝe -i = agi reĝe = agi kiel reĝo.

3. „Pro tio, ke mi ne vidas ian pravigeblan motivon por rompi la paralelecon inter verbigo de O-vortoj kaj de A-vortoj, mi (=D.) kredas ke ankaŭ ĉe verbigo de A-vortoj, la radiko mem ricevas **adverban** signifon”. (blanki = blanke -i = impresi blanke kaj ne: esti blanka.)
4. „Tiu adverbiĝo akcentas ke -i ĉiam havas **agecan, aktivecan** signifon (agadon, procedon, impresadon, efikadon k.t.p.)”
5. Laŭ Zamenhof la verba finiĝo -i eble iam ricevos, sed ne jam havas la signifon de esti. „La bazo de tiu aserto estas, ke -i devas ĉiam havi vere verban (t.e. aktivecan) sencon, kaj tial neniam povas signifi „esti”, ĉar esti esprimas staton kaj ne povas esprimi aktivecon.”
6. „La floroj belas” sugestias al mi (D.) ke la beleco (kvalito tute stata) fariĝas ĉe la floroj aktiva potenco, energiado, dum „estas belaj” signifas staton.

Tiel ankaŭ:

- ĝoji = montri ĝojon, agi ĝoje (to rejoice); ne: esti ĝoja (to be joyful)
- gaji = agi gaje (to make merry); ne: esti gaja (to be gay)
- gravi = signifi multe (to matter); ne: esti grava (to be important)
- kuraĝi = agi kuraĝe (to venture, to dare); ne: esti kuraĝa (to be brave)
- utili = servi utile (to avail); ne: esti utila (to be useful)
- rapidi = agi kun rapideco (to hurry); ne: esti rapida (to be quick)
- sufiĉi = efiki sufiĉe, kontentigi bezonon (to suffice); ne: esti sufiĉa (to be enough)
- egali = efiki egale (to equal, to come up to); ne: esti egala (to be equal)
- malĉasti = agi malĉaste, ne simple: esti malĉasta.

Tiel Downes.

Mi estas konvinkita ke ĉi tiu ĉeno da tezoj estas treege malforta kaj tial facile rompebla.

## § 8.

1. Pri la unua ĉenero, la kategoria divido de radikoj, mi tute konsentas. Sen tio ĉiu debato aŭ polemiko estus eĉ tute malebla. Ĉiu homo ja devas havi en sia menso sufiĉan provizon da **bazaj konceptoj**, t.e. konceptoj pri objektoj, agoj, kaj kvalitoj, por ke li povu **pensi** pri la ekstera mondo, kiel tiu manifestas sin al li. Kaj tiuj tri kategorioj de bazaj konceptoj en la „mondo de pensoj” devas havi siajn respondajn simbolojn en la „mondo de la lingvo”. Nu, tiuj bazaj konceptoj, kiuj en ĉiuj lingvoj estas ĝenerale esprimitaj per **radikoj** (ne per derivitaj vortoj), trovas en Esperanto sian lingvan formon en **radikoj** O-, I-, A-**karakteraj**. (kp. „LingUAGE”, Sapir, 86-113).

2. „Rekta verbigo de O-vortoj adverbigas la radikon”, estas la dua tezo. Ĉu tio estas **tute** vera? Downes prenis la regulon kaj la ekzemplojn el Plena Gramatiko, 2-a eldono, pĝ 51.

Nu, mi sentas grandegan respekton al la verkintoj de P. G. kaj jam plurfoje defendis ĝin kontraŭ ĝiaj atakantoj. Kaj speciale la dua parto: Vortfarado, kies ĉefa aŭtoro estas Kalocsay, vekas mian admiron kaj mi volus ke la Esperantistaro vere pristudu ĝin, anstataŭ ĝemi pri ĝia „diabla malfacileco”, montrante per tio sian propran mensan pigrecon. Sed mia admiro ne faras min blinda pri ĝiaj manketoj. La vortfaraj reguloj de Kalocsay estas grandioza provo por kapti la tuton en kelkaj simplaj reguloj. Ĉe tio minacas tamen la danĝero de trosimpligado.

Zamenhof skribis: „Inter blinduloj **reĝas** la strabuloj”. Ĉu tio vere povas signifi nepre nur: Inter blinduloj la strabuloj **agas kiel reĝoj**? Ĉu vere: Inter blinduloj la strabuloj **estas reĝoj**, estas malĝusta interpreto?

Mi kredas ke ne! Ĉu eĉ la dua parafrazo ne estas pli natura kaj jam tial pli ĝusta? Kaj Zamenhof rimis: „Kie sklav’ regadon havas, tie mastro baldaŭ sklavas”. Tio ja ne estas: La mastro **agas sklave**, sed simple: estas sklavo.

Kaj vidu la unuan linion de Ps. 93, 97, 99: La Eternulo **reĝas**. Efektive la hebrea teksto havas tie verbon kaj ankaŭ la Vulgato, sed en la Psalmaroj nederlanda, ger-

mana, sveda, angla (Common Prayer) ni trovas: La Eternulo **estas reĝo**. Ĉu ili do ĉiuj mistradukis?

Nova Zamenhofa ekzemplo: (Proverbaro 113) Dio longe pacienca, sed severe rekompencas. Ĉu la parafrazo: **estas pacienca** estas malpli bona ol **agi pacience**? La unua ja inkluzivas la duan. (inkluzivas = estas inkluziva!) Kaj ĉu **malpaci** nepre estas: **agi malpace** preferere ol esti malpaca? Ekz. (Prov. 754): Pli bone estas havon fordoni, ol kun homoj malpaci. Kaj ĉu **mizeri** ne tre simple signifas: esti mizera, ekz. (Prov. 897): Kiam sako mizeras, amo malaperas?

Mi ne volas pli **detali** (ĉu detale -i aŭ esti detala?), sed jam sufiĉe pruvigis ke la regulo: „Rekta verbigo de O-vortoj adverbigas la radikon”, estas nekompleta.

### § 9.

La afero estas jena:

Kunmetado per la i-finaĵo **aldonas** al la radiko **verban elementon**, kaj ĉar ĝi estas la ĉefelemento en la kunmeto, ĝi samtempe stampas la tuton kiel verbon. La rilato inter la radiko kaj tiu verba elemento povas esti de diversa karaktero. La radikvorto determinas la agon (ĉi tie la vorto ago estas uzita en sia plej vasta senco) esprimitan de la tuta kunmeto, t.e.: la radiko plimalvastigas, pliprecizigas la sencon.

Nu, verbo povas esti determinata de tri specoj de komplementoj: A. de la objekta komplemento, B. de la predikativa komplemento, C. de la cirkonstanca komplemento (ankaŭ nomita: adverbaj komplementoj kaj: adjektoj).

Konforme al tio la radikvorto en la kunmeto de substantivo + -i povas stari en objekta, predikativa aŭ adjekta rilato al la verba elemento.

Ekzemploj de A.: La radikvorto estas la objekto:

procesi = proceso -i = fari proceson

signali = signalo -i = fari signalon

ombri = ombro -i = doni ombron

tumulti = tumulto -i = fari tumulton

nesti = nesto -i = fari neston

(Ekz.: Ardeoj nestas jam en Marto.)

frukti = frukto -i = doni fruktojn



alarmi = alarmo -i = fari alarmon  
kongresi = kongreso -i = fari kongreson, teni kongre-  
son.

flori = floro -i = doni florojn.

Ĝenerale do: produkti tion, kion la radiko esprimas.  
(Kp.: voĉdoni = doni (sian) voĉon; domkonstrui = kon-  
strui domo(j)n; leterskribi = skribi leterojn.)

Ekzemploj de B.: La radiko estas predikativo:

pacienci = pacienca -i = esti pacienca.

mizeri = mizera -i = esti mizera.

malpaci = malpaca -i = esti malpaca.

sklavi = sklavo -i = esti sklavo.

gasti = gasto -i = esti gasto.

reĝi = reĝo -i = esti reĝo.

Ekzemploj de C.: La radiko estas adjekto.

marteli = martele -i = agi per martelo.

nesti = neste -i = loĝi en nesto.

(Ekz.: Vidu, kiom da kornikoj nestas en tiuj arboj!)

troni = trone -i = sidi sur trono.

sali = sale -i = provizi per salo.

trumpeti = trumpete -i = agi per trumpeto.

ŝtoni = ŝtone -i = mortigi per ŝtonoj.

vesti = veste -i = provizi per vestoj.

sterki = sterke -i = provizi per sterko.

ameli = amele -i = provizi per amelo.

silabi = silabe -i = prononci en silaboj.

La formado de vortoj de tipo C estas tre produktiva, malpli tiuj de tipoj A kaj B. Komprenoble la uzanto de tiaj kunmetoj ne estas ĉiam konscia pri la interelementa rilato, oni transprenas ilin de aliaj, kaj fakte lingva konvencio fiksas la ĝustan signifon.

## § 10.

En Plena Gramatiko ni ne trovas la analizon A: la radiko estas objekto de la ago. Tio tamen ne estas ia eraro, sed konscia, intenca preterlaso. Por eviti kelkajn konsekvencojn necdeziritajn (ekz. ke ŝtonigi povus signifi káj igi ŝtona káj igi ŝtono) Kalocsay sukcesis trovi alian analizon por tiaj kunmetoj. En lia sistemo *domkonstruo* ekz. ne estas formita el *domkonstrui*, sed

inverse. Domkonstrui tie ne estas: konstrui domo(j)n, sed: agi karakterizite de domkonstruo. Same pri voĉdoni, leterskribi k.s. Mi kredas ke la danĝeroj, kiujn K. tiamaniere evitas estas nur teoriaj, kaj ke tiu evitado kreas novajn malfacilaĵojn pli grandajn ol la evititaj.

Tamen ni agnosku ke, tiel agante, Kalocsay per minimumo da reguloj, (eĉ nur tri), sukcesis konstrui tute kompletan, taŭgan kaj admirindan sistemon, bonegan kontribuon al malfacila problemo, ĝuon por ĉiu kiu ŝatas profunde koni nian lingvon kaj kies menso povas ĝoji en tiaj spekulativoj.

\*

Nia celo nun tamen ne estas kritiki la sistemon de Kalocsay. Prof. Downes prenis ĝin kiel elirpunkton, kiel bazon de rezonado. Ni do akceptu ĝin tia, kia ĝi estas, kaj esceptu tiun analizon A.

Restas do la analizoj B, kaj C.: La radiko estas predikativa aŭ adjekta. Kaj tio estas precize la regulo VER III de pĝ. 43 de Plena Gramatiko, kie ni ĝin trovas en jena formo:

„Verba ĉefelemento povas efiki al sia flankelemento 1. per adverbigo, kaj 2. per adjektivigo.”

Kalocsay do ne atentis (aŭ eble pro specialaj motivoj ne akcentis) ĝian validecon ankaŭ por ĉi tiu kazo.

*Kaj atentu la cirkonstancon, ke fakte oni ne verbigas la substantivon mem, sed la kun la substantivo rilatantan adjektivon (adverbon).*

Por diri tion alimaniere: La substantivo povas atingi la verban staton nur kun la adjektivo (adverbo) kiel *peranto*, aŭ kiel Pl. Gr. esprimas tion en aliaj kazoj: La verbigo de substantivoj pasas tra la adjektivigo.

Do, pacienco - paciencia - pacienci = esti paciencia.  
mizero - mizera - mizeri = esti mizera.  
martelo - martele - marteli = agi martele.  
malpaco - malpaca - malpaci = esti malpaca.  
malpaco - malpace - malpaci = agi malpace.

Sola escepto ŝajnas reĝi, sklavi, gasti k.t.p.:

reĝo - REGO - reĝi = esti reĝo.

gasto - GASTO - gasti = esti gasto.

Sed ĉiu scias, ke la predikativa substantivo havas *adjektivan funkcion*, ĝi nome indikas titolon, funkcion, socian pozicion, profesion, metion k.s., do: kvaliton. Tiun tezon kun ĝiaj pruvoj oni povas trovi en ĉiu ne tro malgranda gramatiko (tamen ne en Pl. Gr.), do ŝajnas al mi superflue pruvi ĝin ĉi tie.

Ke gastu signifas ne nepre *agi kiel gasto* Kalocsay rekonas en alia parto de sia libro. En § 12 ni trovas: gastu = *esti en stato* karakterizita de la ideo *gasto*.

### § 11.

La dua tezo de D. (vidu § 7) do baziĝas sur intenca preterlaso de Plena Gramatiko. Sed pro tio la tria tuj fariĝas netenebla. Ĉar por la verbigo de A-vortoj validas la sama regulo VER III *en sia tuta amplekso*.

La paraleleco, kiun deziras Downes, inter verbigo de O-vortoj kaj de A-vortoj ne nur ekzistas, sed estas do eĉ multe pli granda ol li nur povus konjekti. Ĉar esence ni havas *unu kaj la saman fenomenon*, kiel mi provis prui en la antaŭa paragrafo. Nome: oni ĉiam verbigas adjektivojn (aŭ adverbojn).

Tiu paraleleco do ne signifas, ke „ankaŭ” eĉ la verbigo de A-vortoj la radiko ricevas *adverban* signifon. Guste kiel eĉ O-vortoj, la interrilato inter la radiko kaj la verba elemento „-i-” povas esti adverba AU predikativa (adjektiva).

Rimarko: En tiu tria tezo de D. kuŝas ankoraŭ alia eraro, nome en la vortoj „adverba signifo”. — En la tradicia divido de la vortoj en dek klasojn (vortspecoj aŭ parolelementoj) la adverboj formas kvazaŭ la rubejon por ĉiuj vortoj neklasifikeblaj aliloke. Tial oni havas adverbojn de plej diversa karaktero. Pri tio oni jam skribis multe. Sed ĉiuj gramatikistoj certe samopinios pri tiu ĉi tezo: La E-vortoj (do: la derivitaj adverboj) ne formas novan klason de signifo, flanke de la A-vortoj. Ambaŭ ja estas determinantoj. Inter E-vortoj kaj A-vortoj de la samaj radikoj ne ekzistas diferenco de signifo, sed nur de funkcio. (Kon-

sultu ekz.: Structural Linguistics and word-classes de Prof. Dr. A. W. de Groot, en la revuo LINGUA, i.a. pĝ. 454). La signifo ja kuŝas en la radiko. Oni povas diri: Kiam adjektivo uziĝas adverbe, ne la signifo ŝanĝiĝas, sed nur la funkcio. Ankaŭ Kalocsay sentis tion (Pl.Gr., 2-a eld., pĝ. 33, RIM).

## § 12.

Kiel ĉe la O-vortoj ankaŭ ĉe la A-vortoj ni havas: — Derivado per la i-finaĵo **aldonas** al la radiko verban elementon. La rilato inter la radiko kaj tiu verba elemento povas esti tiu de *adverba* aŭ tiu de *predikativa* komplemento.

Sed pro la fakto, ke la radiko nun havas adjektivan signifon en si mem, la predikativa funkcio kvazaŭ trudas sin, ĝi estas preskaŭ *nepra*, *evidenta*, *nepretervidebla*, *natura*.

Por meti tion alie: La grava leĝo de la inerteo validas ankaŭ ĉi tie: Vorto kun adjektiva signifo emas plenumi adjektivan (ĉi tie: predikativan) funkcion. Ĝuste la dua ebleco (adverba funkcio) estas malpli logika, aŭ pli streĉa. En unu diagramo ni do havas: (O = substantiva, A = adjektiva, E = adverba):

Signifo	Funkcio. (Rilato.)	Verba Elemento	VERBO.
pacien <b>O</b>	-A	i	pacien <b>ci</b>
martel <b>O</b>	-E	i	martel <b>i</b>
mizer <b>O</b>	-A	i	mizer <b>i</b>
kongres <b>O</b>	-E	i	kongres <b>i</b>
patr <b>O</b>	(A)	i	patr <b>i</b>
reĝ <b>O</b>	(A)	i	reĝ <b>i</b>
kuraĝ <b>A</b>	-A	i	kuraĝ <b>i</b>
egal <b>A</b>	-A	i	egal <b>i</b>
prav <b>A</b>	-A	i	prav <b>i</b>
blu <b>A</b>	-E	i	blu <b>i</b>

### § 13.

Tiu dua ebleco, nome, ke adjektivo povas rilati al verba elemento ankaŭ **adverbe**, donas al poetoj kaj aliaj poeziaj homoj la okazon surprizi kaj trafi nin per **ne-kutimaj** esprimoj.

Ekz.: La nederlanda verkistino Héléne Swarth iam skribis:

„En zie, hoe **blauw** de hemel **blauwt**  
Boven de velden, geel als goud”.

(Kaj **blue** super ni la ĉielo **bluas**,  
Sur kampoj, kie greno ore fluas.)

Tio estas trafa priskribo. La ĉielo ne nur „estas blua” sen pli, sed ĝi pompas per sia blueco, ĝi paradas, fiere montrante sian bluan mantelon, ĝi trudas al ni sian bluecon, imponas nin per ĝi.

Ĝuste pro sia **NEKUTIMECO** tiaj esprimoj estas tiel okulfrapaj, kaj pruntas specialan estetikan valoron al la teksto.

Sed nun S-ro Downes deziras, ke tiuj nekutimaj esprimoj estu ĝuste la regulecaj! Tio estus perdo por nia lingvo, ne gajno!

Tiaj nekutimaj verboj el adjektivoj ne estas eblaj per ĉiuj adjektivoj. Adjektivoj ja povas esprimi multajn rilatojn. S-ino Vechtman-Veth, en sia angla gramatiko por nederlandaj studentoj, faris provon por dividi la adjektivojn en 6 klasojn. (Mi revenos al tio poste.)

Nu, la ebleco de tiu nekutima formado dependas **de la esenca signifo de la radikvorto**. (kp. § 6)

Ni vidas en **blui**, ke ĝi estas ebla ĉe adjektivoj, kiuj indikas kvaliton de la eksteraĵo, kiel koloroj, formoj, mezuroj. Sed mi dubas, ĉu estos eble serĉi regulojn por tio. Ni lasu iom da libereco al niaj poetoj, ekzemple por skribi: „Sur la podio la gravuloj eminentis, Dum la aŭdantoj sin humile sentis!”

### § 14.

En sia kvara tezo S-ro Downes deklaras, „ke la adverbigo de la radikoj akcentas, ke „i” ĉiam havas **agecan, aktivecan** signifon”.

Oni do povus mokete paroli pri „circulus vitiosus” (fatala cirklo), aŭ pri la serpento mordanta propran voston.

Ĉar: la i-finaĵo do unue adverbigas, kaj poste la ad-  
verbo pliakcentas la i-finaĵon. Stranga rezonado!

Sed la kerno de la tezo kaj de la sekvanta kvina tezo estas, „ke „i” devas ĉiam havi vere verban (t.e. aktivecan) sencon”.

— Sed... ĉu la vera senco de la verbo estas la esprimado de aktiveco? Se tio estus vera, S-ro Downes estus solvinta problemon, kiu pensigas filozofojn kaj lingvistojn jam de la tempo de Aristotelo!

Efektive, ĉiuj verboj, aŭ pli bone, la nociaroj esprimataj per verboj, devas havi ian komunan faktoron, kiun aliaj vortoj ne havas, alie estus sencece distingi ilin kiel apartan klason. Sed ĉu tiu komuna faktoro estas la aktiveco, do **agado**? Aliaj diras: la komuna faktoro estas la **tempo** (kp. **Zeitwort**), aliaj diras: Ili esprimas agon AŬ staton. Aliaj: Ili esprimas „proceson” t.e. ion okazantan dum pasado de la tempo.

Modernaj gramatikistoj emas lasi la problemon nesolvita. Ili diras: Tiu komuna faktoro estas tio, kio stampas verbon kiel verbon; aŭ: Tiu komuna faktoro estas la portanto de la nocio „verbo”. Fakte ili do diras: Ĉiu **scias**, kio estas verbo, sed neniu povas **diri** kun absoluta precizeco en mallonga difino, kio estas verbo.

Nu, ĉar ĉiuj Esperantaj verboj havas la finaĵon „i” komuna, ni povus difini: „I” estas la ekstera signo de tiu komuna faktoro en ĉiuj verboj”. „I” signas (atentu „signas”, ne: estas) tion, kio verbon stampas verbo.

Kaj tio estas la sola semantika valoro de „i”, la sola „enhavo de signifo”.

#### § 15.

En sia kvina tezo D. apelacias al la Lingva Respondo de Zamenhof (vd. § 1). Estas tre interese, ke Zamenhof skribis tiun respondon (ke „as” ne estas „estas”) en Aprilo de la jaro 1907.

La tutan antaŭan vintron li ja laboris super reformprojekto, kontraŭkore, sed por kontentigi la francon Javal, kies kunlaboron en la movado li tre alte taksis. Unu el la kvazaŭ eldevegitaĵoj „neologismoj” estis:

„Anstataŭ „esti” kaj ĉiuj ĝiaj formoj estas uzata „i” kun ĉiuj ĝiaj formoj”. (Leteroj de Zamenhof I pĝ. 197, 249, 306, 313, 315.)

En Januaro 1907 Z. ŝovis la tutan reformprojekton en tirkeston kun la espero, ke ĝi neniam plu estu aktuala.

Al Javal li skribis: „Peza ŝtono defalis de mia brusto, kiam mi legis, ke vi estus kontenta, se mi reprenus mian projekton de neologismoj”.

Kaj al Boirac: „Nun mi kun plezuro povas sciigi, ke la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. La ĉefa postulanto de plibonigoj, la multemerita D-ro Javal, konsentis, ke mi retiru mian projekton, kaj tial mi faras tion ĉi kun plezuro, kaj mia projekto ne estos prezentata al la Lingva Komitato”.

Relegu nun la koncernan LR. kaj ĝi aperas en tute alia lumo. Zamenhof kvazaŭ kun faciligo de sia koro konstatis, ke „i” ne jam estas „esti”!

Efektive: La formoj „amatas, amintas” ne prezentas tiajn avantaĝojn, ke oni povus rekomendi ilin. Ido havas tiajn formojn: amesas = estas amata; amabis = estis aminta; amesabis = estis amita. („Se Javal vivus plue, li fariĝus Idisto”, skribis Waringhien. L.d.Z.I. 336).

Kaj pri tiuj formoj D-ro Manders prave skribis: „En artefarita lingvo, kiu strebas al la plej granda lernebleco por kiom eble plej granda nombro da homoj, ne estas pravigeble, enkonduki, flanke de la malfacilaj particip-konstruoj, la ankoraŭ pli malfacilajn, mallongajn formojn nur pro estetikaj konsideroj” (Vijf Kunsttalen, pĝ 301) (trad. D. H.) Plue Manders rimarkigas, ke ili ne signifas simpligon de la lingvo, ĉar oni povas ilin nur kompreni, se oni konas ankaŭ la paralelajn formojn kun la participoj.

Tio sama validas por „amatas, amintas”. Ili estas malfacile kompreneblaj, nur post analizo. La pasivaj formoj (ekz.: Laŭdatu la Sinjor’) ne sonas tiel strange en la oreloj de instruitaj homoj kiel la aktivaj, verŝajne pro influoj de la Latina lingvo (Laudate Dominum, kio tamen estas imperativo) kaj pro la fakto ke pasivaj nekompleksaj formoj ankoraŭ ekzistas en kelkaj lingvoj, ekz. la skandinavaj. Tio tamen ne estas sufiĉa motivo por aprobi ilin.

Krome: Esperanto jam havas la „medialajn” formojn kun iĝ kaj tiuj proksimiĝas tre strikte al la pasivo.

Ekz.: 1. La tertremo skuis la murojn. 2. La tertremo igis la murojn skuiĝi. 3. La muroj skuiĝis pro la tertremo. Kaj nun ankoraŭ: 4. La muroj sku-ATIS de la tertremo????? Tio vere signifus malevoluon. Lingvoj strebas al plisimpligo, tiuj, kiuj havis tiajn subtilaĵojn en antikvaj tempoj, perdis ilin, kaj ĉu Esperanto strebus al re-enkonduko de arĥaismoj?

Sufiĉaj motivoj por la Zamenhofa malaprobo!

Sed strange estas, ke **Zamenhof ne uzis ilin**. Li diris, ke tiaj formoj nur estus korektaj, se „i” signifus „esti”!

Kaj tiam li mem „pekis” kontraŭ tiu regulo, uzante kuraĝi = esti kuraĝa, kaj multajn aliajn (vidu § 2-5).

Eĉ pli: Ekzistas alia Lingva Respondo de Zamenhof, en kiu li rekte aprobis tiajn formojn. (Kaj mi dankas S-ron M. C. Butler, kiu afable atentigis min pri tio).

Ĝi estas trovebla en „The British Esperantist” 1948, pĝ. 193. En ĝi Zamenhof rekomendis traduki du grekajn verbojn per „esti pia, esti feliĉa” kaj daŭrigas: „Sed se oni nepre bezonas havi unu vorton, oni povus traduki: **piesti, feliĉesti**, aŭ (eble eĉ pli simple) **PII, FELIĈI**”!

Konsiderinte ĉion ĉi mi kredas, ke oni faras malĝustan uzon de la L.R. el 1907 pri „amatas” por kondamni la senperan verbigon de adjektivoj, ĉar:

1. Zamenhof skribis ĝin sendube sub influo de la ĵus reprenita reformprojekto al Javal.

2. Ĝi temas ne pri vortfarado, sed pri ŝanĝoj en la verbosistemo.

3. Zamenhof neniam obeis sian tie donitan regulon pri: „i” ne estas „esti”.

4. En alia L. R. li aprobis, eĉ mem proponis formojn kiel pii, feliĉi.

Cetere, mi kredas, ke Zamenhof en tiu L. R. de 1907 faris pens-eraron, kiu ankoraŭ nun en la tuta debato pri la senpera verbigo de adjektivoj ludas gravan rolon kaj kiun oni ĝis nun ne rimarkis.



§ 16.

Zamenhof skribis en tiu lingva respondo (vd. § 1): „Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tiu okazo, se „as, is” k.t.p. signifus „estas, estis”, sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo esti, tamen ĝis nun (1907) ili tiun ĉi signifon ne havas”.

La diversaj interesigantoj, kiuj en „La Progresanto” esprimis sian opinion pri la diskutata temo, ĉiuj akceptis tiun Zamenhofan eldiron sendispute.

Faulhaber konstatas, ke, akceptante ĝin, oni ne povas ne rimarki, ke pluraj difinoj en Plena Vortaro donas „eraran analizon”, ekz.: furiozi = esti furioza; kaj ke Zamenhof plurfoje ne obeis sian propran regulon. Plue, ke en moderna Esperanto, la senpera verbigo de adjektivoj tiel abundas, ke ni devas nin demandi, ĉu ni eble jam atingis tiun „malpli frue” el la L. R. de Zamenhof. Alivorte: Ĉu -i nun, en 1955, povas signifi ‚esti’, malgraŭ la malaprobo de 1907?

Kruit atentigas, ke la regulo -i = agi (kiel asertas profesoro Downes), nenie troviĝas en la Fundamento, sed ke -i = esti aperas en la Ekzercaro, en la formoj *s a n i*, *s a n u*, *k u r a ĝ i*. Tamen, li daŭrigas, „tio ne signifas, ke -i nepre devas esti ‚esti’, ĉar Ekzercaro kaj Fundamenta Gramatiko ne estas samaj aferoj”. Tio lasta montras, ke Kruit ankoraŭ tenas je sia stranga tezo, ke la Ekzercaro estas malpli „fundamenta” ol la unua parto de nia „Fundamento”, kvankam Zamenhof klare diris, ke Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro **kune** formas la netuŝeblan fundamenton de nia lingvo. Aliaj opinias, ke la respondo de Zamenhof donas **teorian** regulon, kiun la evoluo de la lingvo eĉ jam en la lingvo de Zamenhof mem flankenŝovis.

La tuta problemo ŝajnas do pivoti sur tiu lingva respondo de Zamenhof, speciale sur tiu eldiro: „I ne (jam) estas ‚esti’”, kaj ĉiuj akceptas ĝin senkritike, kvankam mirante pri la Zamenhofa ne-observado de la propra regulo.

Mi kredas tamen, ke Zamenhof (sub influo de la reform-manio, kies sklavo li estis dum la antaŭa vintro, (§ 15) faris penseraron. Kaj tiun saman penseraron faras prof. Downes, kiam li tezas: „I = agi”.

Ĉar atentu:

Kuraĝi = esti kuraĝa (§ 2)

Egali -- esti egala (§ 2)

Reĝi = esti reĝo (§ 8 kaj 10)

Pri tio ne povas esti dubo. Sed ĉu tio pravigas la konkludon: **Do -i = esti?**

Laŭ Downes:

Kuraĝi nur estas: agi kuraĝe (§ 7)

Gaji nur estas: agi gaje (§ 7)

Rapidi estas: agi rapide (§ 7)

Kaj ĉiuj konsentas, ke:

Marteli -- agi martele (§ 9)

Kongresi = agi kongrese (§ 9). Sed ĉu tio pravigas la konkludon de Downes: **Do -i = agi?**

## § 17.

Ambaŭ konkludoj estas same malĝustaj.

Se la signifo de kuraĝi = esti kuraĝa, tio pruvas nur, ke inter la du elementoj de la verbo, do inter la radiko kuraĝ' kaj la verba elemento -i, ekzistas **predikativa rilato**, kiu, (tre ĝenerale) povas esti esprimita per la verbradiko **est'**.

Se la signifo de marteli = agi martele, tio pruvas nur, ke inter la du elementoj de la verbo, do inter la radiko martel' kaj la verba elemento -i, ekzistas **ad-jekta (adverba) rilato**, kiu (tre ĝenerale) povas esti esprimita per la verbradiko **ag'**.

Alivorte: en la vorto kuraĝi la nocio **est'** ne estas esprimita per -i, sed **implicita** de la **rilato** inter la du elementoj.

Same: En marteli la nocio **ag'** ne estas esprimita per -i, sed **implicita** de la **rilato** inter martel' kaj -i.

**Do:** I signifas *nek* esti, *nek* agi, I estas kaj restas nur .... I, t.e. la komuna faktoro de ĉiuj verboj, tio, kio faras verbon verbo! (vd. § 14).

Nun ni povas reiri al nia diagramo de § 12:

reĝo-A-i		reĝ-est-i.
kongreso-E-i	=	kongres-ag-i.
kuraĝa-A-i	=	kuraĝ-est-i.
martelo-E-i	=	martel-ag-i.
blanka-A-i	=	blank-est-i.
blanka-E-i	=	blank-ag-i.

Kuraĝ' do restas kuraĝ, -i restas nur -i, kaj la rilato inter ambaŭ estas predikativa (adjektiva).

Est' do kongruas kun tiu ne esprimita rilato kaj est' ne kaŝigas ie en -i. Same en marteli ag' signas la rilaton, sed ag' ne troviĝas en -i.

Ni trovas interesan konfirmon de tiu analizo en Ps. 91 : 7, 12, 13. Tie la germana biblio havas „grünen” (= verdi), la sveda havas „grönska” (= verdi) kaj Zamenhof trifoje skribis VERDESTI.

Kaj tion saman ni trovas en lia lingva respondo, kiun mi donis en la fino de § 15.

### § 18.

Se ni akceptas mian konkludon de § 17 (I estas nek esti, nek agi, ĝi estas nur -i.) ni agas tute kaj plene laŭ la spirito de nia Esperanta vortformado, eĉ laŭ la spirito de vortkunmeto en la hindeŭropaj lingvoj ĝenerale.

En la formado de kunmetitaj vortoj la interrilatoj inter la diversaj elementoj ja ofte ne esprimiĝas kaj la homa menso, la menso de la uzanto, kvazaŭ plenigas la malplenajn lokojn inter tiuj elementoj. Nederlanda proverbo diras: „Bona aŭskultanto bezonas nur duonan vorton” kaj nia Proverbaro (1129) instruas: „Saĝa kapo duonvorton komprenas”. Tio ne nur validas en la socia vivo, ĝi estas tute vera ankaŭ en la vortformado.

La signifo de la tuto en ia kunmetita vorto sekvas el la **ebla** rilato inter la kunmetantaj elementoj (kp. § 6). La viro kuraĝas, **povas** signifi: La viro estas kuraĝa, sed: la viro martelas **ne povas** signifi: la viro estas martelo.

Estas kiel en la ĥemio: Se oni metas elementojn kune, sub kondiĉoj kiuj ebligas al ili formi novan kunmetaĵon, ili formas la ŝtofon, kiun tiuj elementoj laŭ sia propra

naturu **POVAS** formi. Ĉiu elemento kvazaŭ falas en la lokon, kiun ĝia interna valoro destinas al ĝi.

Ekzemploj abundas: Ni prenu: tetrinkado, teplukado, teodoro (ne Teodoro!), telaso, teprezoj, te-ejo, tetuko, kaj la neesprimitaj rilatoj inter te' kaj la alia elemento estas tre diferencaj.

Ankaŭ bonan ekzemplon donis la rimarko de Kalocsay: La aŭtomato estas sprita aĵo, sed ĝi ne estas sprita aĵo. Efektive: En vortkunmeto validas: **LA TUTO ESTAS PLI OL LA SUMO DE LA ELEMENTOJ.**

La kunmeto prenas en sin kiel eble plej malmulte da materialo, la ĝusta signifo de la tuto estas kvazaŭ nur aludita de la konsistigaj elementoj, kunteksto kaj lingva tradicio fiksas tiun signifon el la esprimitaj nocioj plus el la implicitaj rilatoj inter tiuj nocioj.

Tial oni neniam dubas pri la ĝusta signifo de ekz. ormino flanke de orĉeno kaj flanke de orfiŝo.

Precize la saman fenomenon ni havas ĉe la verboj derivitaj el adjektivoj aŭ substantivoj. En § 9 ni vidis ke nesti povas signifi fari neston, sed ankaŭ: loĝi en nesto.

Kaj kiam ni skribas: La rivero **serpentas** tra la valo, ĉiu tuj komprenas nin. Sed estus preskaŭ neeble difini la implicitan rilaton inter serpent' kaj -i en la verbo serpenti. Oni povas diri: agi serpente, aŭ: agi kiel serpento, sed tiam oni devas ja tre elaste plivastigi la noción „agi"! Kaj oni povas diri: esti serpenta (= serpent-simila). Sed oni nepre ne pensu, ke tiu ag' aŭ est' iamaniere estas „signifoj" de la elemento -i! Tio estus same malsaĝa kaj erara kiel la konkludo, ke el: flori = havi (produkti) florojn, sekvus ke **do** -i = havi. Almozi = peti almozojn, sed ĉu **do** -i = peti?

Kaj ĉu vi komprenas la tekston el Rut 1 : 16: „Kien vi iros, mi ankaŭ iros kaj kie vi **noktos**, mi ankaŭ **noktos**? Jes, vi tuj komprenas ĝin! Sed ĉu noktĭ = agi nokte? Aŭ ĉu eble ia analizo kiel: „agi iel rilate al la nokto" kontentigos vin?

Ĉu estas al vi grave, ĉu la frazo: La medicino utilis al la malsanulo, signifas: La medicino **estis utila**, aŭ: La medicino **agis** (efikis) **utile**? Ĉu ĝi ne enhavas ambaŭ ideojn samtempe kaj nedisigeble? Kaj ĝi povas enhavi ambaŭ ideojn, ĝu **s t e**, ĉar la rilato inter la du elemen-

toj ne estas detale dismetita. Tio estas granda avantaĝo, ne forgesu tion!

Oni do ne konstruu diferencojn, kie ili ne ekzistas. Tion faras prof. Downes per siaj ekzemploj (vd. § 7 sub 6). Ni jam pruvis tion por gaji (§ 3) kaj por ĝoji (§ 5). Sed ankaŭ la aliaj ekzemploj estas tro „elkovitaj”. Ekz.: Li diras: Gravi = to matter, kaj ne: to be important. Sed laŭ Oxford Dictionary to matter = **to be of importance!**

Kuraĝi = to venture, to dare. Sed OD donas por to dare i.a.: **to be bold**. Kiam oni diras: Li kuraĝis ataki la kastelon, tio ja samtempe enhavas: li **agis** kuraĝe, kaj: li **havis** kuraĝon, kaj: li **estis** kuraĝa. Tion oni ja ne povas apartigi unu de alia!

Sufiĉi = to suffice kaj ne: to be enough. Sed OD donas por to suffice: **to be enough, to be sufficient, to be able or competent to do something, to be enough for**. Ankaŭ ĉi tie oni ne povas apartigi la **staton** de sufiĉeco kaj la **agon** de „provizi sufiĉan kvanton”. Tiaj distingoĵoj estas falsaj.

Ni do vidis ke ekzistas nenia lingva aŭ gramatika krimo en ekz. pravi = esti prava. Sed, kiel sekvo de la lingva respondo de Zamenhof, kiun oni ne sufiĉe kritike esploris kaj ne vidis kontraŭ la fono de la reformprojekto por Javal, oni deiris de tute neĝusta punkto kaj tute misprezentis la problemon, esplorante ĉu -i signifas **agi** aŭ **esti**, dum ĝi signifas simple nur -i, kaj ne pli!

## § 19.

Vidinte, ke en la senpera verbigo de adjektivoj kuŝas nek „gramatika krimo”, nek „lingva krimo”, (kp. § 7), ke ĝi estas tute Zamenhofa kaj tute konvena al la karaktero de la lingvo Esperanto, oni komencas miri pri la averto de S-ro I-ro Isbrucker en la kongreso de Haarlem, kie li eĉ diris: „Uzante tiajn fuŝajn esprimojn oni kripligas la lingvon”.

Kompreneble devas esti iaj kaŭzoj por tiel paroligi la prezidanton de nia Akademio. Kvankam oni komprenos post mia traktaĵo, ke miaopinie S-ro Isbrucker multe tro absolute kaj draste esprimis sin, mi povas vidi du tiajn kaŭzojn:

1. La senpera verbigo de adjektivoj estas fremda al la karaktero de la hind-eŭropaj lingvoj.

2. La Esperantistoj estas, kiel ludantaj infanoj, troige uzantaj sian liberecon koncerne ĉi tiun fenomenon.

Pri ambaŭ punktoj mi diru iom: 1. Efektive; estas neeble diri ekz. en la angla lingvo: His face reds (= estas ruĝa); kaj jam kiel knaboj en la junularklubo ni faris demandojn pri Daniel 4 : 4, kie la nederlanda biblio havas: Ik was groenende in mijn paleis (Mi estis verdanta en mia palaco). Svedoj ne povas diri: Huset gamlar aŭ Germanoj: Das Mädchen schön!

Tiu fremdeco estas vere argumento *kontraŭ* la senpera verbigo de adjektivoj en Esperanto, ĉar tiu lingvo ja kreskis el hindeŭropaj radikoj! Sed argumento ne tre forta, ĉar jam la teorion (grizan, laŭ fama germano) venkis la vivo (verda, laŭ la sama).

Kaj ankaŭ: Ke ni en niaj naciaj lingvoj ne povas esprimi nin tiel, estas nur afero de (hind-eŭropa) idiom! Ekzistas centoj da lingvoj en kiuj tiaj formoj estas tute regulaj kaj kutimaj. Eĉ, ekzistas multaj lingvoj en kiuj ekz. adjektivo kiel „ruĝa” tute ne ekzistas, kaj kie la uzantoj devas derivi vorton por tiu nocio el verbo kun la signifo „ruĝ-esti”.

Oni do ne diru tro baldaŭ, ke la de Isbrucker kondamniĝa fenomeno estas „tute kontraŭa al la parolkutimoj de la homaro”, ĉar tiu homaro havas parolkutimojn neimageble plej diversajn.

2. La Esperantistoj troigas! Tion tre bone karikaturigas jena poemeto el Heroldo (6-6-1932):

#### PRINTEMPAS.

*Bluas, flavas, verdas, florpharumas;  
Merlas, turdas, sturnas, kaj birdidas;  
Vermas, vespas, abel-skarab-zumas;  
Larvas, raŭpas, kaj ekrizalidas;  
Kverkas, fagas, fungas, kaj filikas.  
Bovas, kapras, porkas, kaj ŝafidas;  
Stelas, lunas, nubas, sunefikas;  
Cignas, pavas, kokas, kaj akridas.  
Jen! rolzrojsas, bencas, citroenas,  
Fordas, fiatas... (la leganto svenas!)*

## § 20.

Restas fine la demando: Ĉe kiuj adjektivoj oni povas verbigi rekte kaj kiam ne?

1. Rimarku unue, ke multaj tiaj formajoj tute ne ĝenas nin aŭ faras eksterordinaran impreson. La kaŭzo estas tre simpla: Ili ne ĝenas, se nia propra lingvo esprimas la saman nocion per jam ekzistanta (plej ofte nekunmetita) verbo.

Tiaj estas ekzemple: inklini, avidi, furiozi, atenti, superi.

2. Cetero multe dependas en tio de la propra lingvo. Por Angloj la esprimo: „Ĉu tio gravas?” certe ne sonos strange, ĉar ĝi tute kongruas kun: „Does it matter?” Sed kiel Nederlandano miaj oreloj devis unue alkutimiĝi al la sama esprimo. Ĉu eble iu Anglo uzis „gravi” kiel unua? Aŭ ĉu gravi naskiĝis kiel analogio al la Zamenhofa pravi? Konsciigu, ke tiu lasta verbo ekzistas en neniu el la grandaj okcident-eŭropaj lingvoj (to be right, avoir raison, recht haben, gelijk hebben) kaj tamen ne kaŭzas malfacilaĵojn!

Por alilandanoj estas strange, ke la angla lingvo ne havas verbon por „ne-paroli”. Ĝi helpas sin per „to be silent”. Tial mi povus kompreni, se *silenti* estas tute ordinara vorto por Nederlandanoj, Francoj, Svedoj, Germanoj k.t.p., sed se Angloj sentas tiun verbon kiel „esti silenta”. (kp § 5) Sed tio certe ne influas la facilecon de lernado aŭ de komprenado.

3. La rekta verbigo de adjektivoj ne ĝenas, ĝuste se la adjektiva karaktero de la radiko estas tute nepra, ankaŭ en la naci-lingva ekvivalento. Kiel ekzemplon mi prenas: *vana*. Tiu nocio estas, kiom mi scias, en aliaj eŭropaj lingvoj, ĉiam esprimita ankaŭ per adjektivo. Kaj ĝuste tial la verbo *vani* estas tute klara: Ĉiuj liaj klopodoj *vanis*. Tio ankaŭ validas por *sani* kaj *malsani*. La sola ebla rilato inter san' kaj -i ja estas la predikativa (kp. § 6, 18)

4. En § 13 ni jam priparolis la nuancon de koloradjektivoj verbe uzitaj. Jam Kabe uzis tiun eblecon: „Sur kampoj *verdis* la lino kaj tritiko”. Tian saman nuancon notis prof. Downes en „maldekstre *grandegis* la krutegajoj” (Fabiola p. 184)

Sed neniu diros: Mia plej juna filino jam tiel *grandas*. Kial ne? Ĉu do ekzistas adjektivoj, kiuj, pro sia esenca signifo, kontraŭstaras sian senperan verbigon? Tio kondukas nin al nova tasko: la divido kaj klasifiko de la adjektivoj. Tiun taskon entrepreni estas tamen ekster la kadro de ĉi tiu artikolserio.

La sola klopodo por veni al tia divido, kiun mi konas, estas de S-ino Vechtman-Veth en angla gramatiko por nederlandaj studentoj. (kp. § 13). Kelkaj el ŝiaj konstatoj estas ĉi tie uzablaj.

Unu el la klasoj de ŝia divido estas: la *objektiva* klaso. Adjektivoj de tiu klaso ne havas komparativon aŭ superlativon, ne povas esti determinitaj per adverboj de grado, ne povas esti uzataj predikative. Ili nomas ian atributon, bazitan sur ia divido.

Ekz.: mia dekstra piedo; ekzotaj birdoj.

Efektive, oni ne povus diri: Ĉu via piedo *dekstras*? Vidu, kiel tiuj birdoj *ekzotas*.

Plej ofte tiaj objektivaj adjektivoj estas en Esperanto derivitaj el substantivoj: *nokta* vizitanto, *kristana* religio, *poetaj* verkoj, *reĝa* palaco, *patrina* kiso. Tiaj adjektivoj ne estas predikative uzablaj (en la sama signifo almenaŭ). Oni ne povas diri: La vizitanto estas nokta, do ankaŭ ne: La vizitanto noktis. Same ne: la religio kristanas, la palaco reĝas, aŭ, la kiso patrinas (Notu, ke ekz. la palaco estas reĝa, ne plu signifas: estas de la reĝo, sed: estas reĝeca.)

Duan klason, ankaŭ preskaŭ tute objektivan, ni jam renkontis en la adjektivoj esprimantaj kvaliton de la eksteraĵo kiel koloroj, formoj. Kvankam ĉi tiuj adjektivoj estas predikative uzablaj, ili diferencas de la subjektivaj en tio, ke ili estas pli „neŭtraj”, pli „faktaj”. Dirante: La rozo estas ruĝa, ni simple konstatas fakton, dum en: La rozo estas bela, ni donas nian opinion kaj prijuĝon.

Kaj ĝuste ĉe tiuj „faktaj” adjektivoj ni trovis la fenomenon de nuanciĝo inter *esti verda* kaj *verdi*. (§ 13, § 20; 4).

Ni jam vidis, ke ĉi tiu fenomeno, speciala ĝuste por ĉi tiu klaso, de prof. Downes estis erare interpretita



kiel ĝenerala bazo por altrudi al ĉiuj senpere verbigitaj adjektivoj adverban karakteron, (§§ 11, 12, 13). Nun estas klare, kial „Mia plej juna filino jam grandas”, sonas komike. Se oni volas simple esprimi, per la vorto granda, la neŭtralan fakton, la konstaton, ke ŝia korpo havas tiom kaj tiom da ulnoj, oni ne povas uzi la (en ĉi tiu klaso) nuanciĝantan verbon grandi, sed devas diri: Si estas *granda*.

Restas la subjektivaj adjektivoj, kiuj esprimas ian kvaliton kvazaŭ relative, t.e. dependa de la opinio, de la aprobo aŭ malaprobo, de la ŝato aŭ malŝato, de la taksado de tiu, kiu parolas.

Ekz. Si estas laca; li estas granda verkisto; profunda respekto, saĝa virino k.t.p. Inter ili havas apartan lokon tiuj adjektivoj, kiuj esprimas la manieron, laŭ kiu iu agas en ia funkcio aŭ kapablo. Ekz. Si estas *bona* patrino, sed *malbona* edzino, t.e. bona en siaj patrinaj devoj, sed malbona en sia edzina vivo. Aŭ: Li estas granda verkisto, t.e. granda kiel verkisto.

Ŝajnas al mi (sed mankas ankoraŭ sufiĉe da materialo), ke neniu Esperantisto diros: Kiel verkisto li *grandas*, aŭ: En siaj patrinaj devoj ŝi *bonas*.

Sed ĝuste inter la ceteraj subjektivaj adjektivoj la senperaj verbigoj trovas sian terenon, vidu la ekzemplojn en §§ 1-4.

Prudente uzite, tiuj verbigitaj adjektivoj ne nur ne ĝenas en la lingvo, sed donas al ĝi pli grandan flekseblecon kaj stilan diversecon. Ili tamen restu „travideblaj”. Tial mi ne povas admiri la miaopinie tro longajn: konstateblas, rimarkindas k.s.

La averto de S-ro Isbrucker estu do modifita jene:

1. La Esperantistaro gardu sin kontraŭ senkritika uzado de ĉiam pli multaj verbigitaj adjektivoj.

2. Ĉi tiu fenomeno, kvankam esenca en la Esperanta vortformado, kaj jam amplekse praktikita de Zamenhof mem, meritas kaj bezonas trankvilan evoluon.

3. Imitemo kaj ludemo povus kaŭzi misevoluon en tiu fenomeno, kiu estas pli komplika ol ĝi ŝajnas ĉe unua vido.

H. A. de Hoog (Aŭgusto 1955)

## enhavo

- § 1 Ĉu nova malsano?
- § 2-4 Ekzemploj de Zamenhof kaj aliaj.
- § 5-6 Adjektivigo de verbaj radikoj.
- § 7 Defendo de la malkonsilo.
- § 8-10 Rekta verbigo de substantivoj.
- § 11-13 Rekta verbigo de adjektivoj.
- § 14 La komuna faktoro en ĉiuj verboj.
- § 15 La Zamenhofa Lingva Respondo.
- § 16-17 Penseraro; signifo de -i.
- § 18 Karaktero de kunmetoj.
- § 19 Kaŭzoj por la malkonsilo.
- § 20-21 Ĉu reguloj estos eblaj?

DE LA SAMA AŬTORO :

# „DU MALSANOJ EN ESPERANTO”

KIA-ISMO; TIOM-KIOM-ISMO.

Studo pri la uzado de kelkaj korelativoj  
en Esperanto.

Eldono de :

Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo. Poŝtg. 343481

Prezo Sv.kr. 4:—

## El la recenzoj :

La aŭtoro montras la ĝustan metodon el la plej  
moderna lingvo-sciencia vidpunkto.

Edmond Privat.

Mi trovas la libron ĉiel bonega, kaj tre helpa  
por la ortodoksa subteno kaj defendo de nia  
lingvo.

J. Régulo Pérez.

Ne nur gramatikuloj, sed ankaŭ laikuloj trovas  
en ĝi trafajn argumentojn kaj ĝue tralegos ĉiujn  
paragrafojn.

F. Baronnet.

Ĉi tie ni havas majstran dismeton pri temo, kiu  
konfuzis multajn, inkluzive de mi mem kaj ĝi  
meritas seriozan atenton.

La argumentado estas (por mi) konvinka.

M. C. Butler.

Oni des pli ekĝojas, ke finfine troviĝas almenaŭ  
unu gramatikisto, kiu ne estas teda.

Al ĉiuj, kiuj volas ekscii pri la maniero pri-  
trakti metode kaj senpartie, klare kaj inteligente  
gramatikajn demandojn, al ĉiuj, kiuj volas ion  
eklerni pri la lingvistikaj kapabloj de Zamenhof,  
al ĉiuj fine, kiuj deziras legi sentedajn prezen-  
tadojn de seriozaj temoj, mi ege konsilas tiun ĉi  
libron, kiun mi rigardas ĉefverko en la lingva  
fako de nia literaturo.

G. Waringhien.